




KUSPE

"KUSPE" Oficiala Informilo de Eŭska Esperanto-Asocio
Euskal Herriko Esperanto Alkartearen Aldizkaria




NE PLU VUNDU
LA TERAN KERNON!

UTILAJ ADRESOJ

Eldonas: Euska Esperanto Asocio.

Zapateria 29.

E-01001. Vitoria- Gasteiz.



Kunordiganto: Rafael Blanco Arbe.

Larrainbide 3, 3. ezk.

E- 31800. Altsasu. Tlf.: (9-48) 56 38 99

ALAVO. ALAVA ESPERANTO ASOCIO.

Sekretariino : Isabel Aspe-Montoya.

Los Herran 1, 4. ezk.


E- 01004. Vitoria- Gasteiz. Tlf.: (9-45) 25 79 54



BISKAJO. GRUPO ESPERANTISTA.'

Barrenkale Barrena 7, 1. esk.

E- 48005. BILBAO. Telf.: (9-4) 620 19 18. (19.00- 21.00)



NAFARO. ASOCIACION ESPERANTO NAVARRA.

Casa de la Juventud. Gaztediaren Etxea.

Sangüesa 30. E- 31005. Pamplona - Iruñea.



La enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio
aŭ agadprincipoj de la Asocio.



SALUT-VORTOJ

Kaixo kara leganto. Post ege klimato seka somero ni revenas en ĉiordiganta aŭtuno pretaj rezisti la komencon de la politika kurso. Miamense tiuj-ĉi tagoj pli ligiĝas al la fino de la ciklo de popolaj festoj, infanoj revenantaj lernejen, surplanke kuŝantaj kaŝtanoj, terpoma kaj vinberrikoltado kaj mallongiĝo de la lumtaga tempo, sed la politikistoj kaj ĵurnalistoj ankaŭ emas partopreni tiun-ĉi kalendar-spacon.

Temas pri tempo por renkontiĝi kaj rakonti la spertaĵojn de la ĵus fuĝintaj ferioj, lumbild-projektadoj, fot-montradoj, kaj plengemaj intencoj rigarde la venontajn monatojn, "Jes, ĉi-jare mi partoprenos tiun kurson pri... kaj sportumos ...foje semajne...".

Ni ankaŭ rekomencas la taskon plenary je iluzio en KUSPE. Kune kun la tradiciaj fakoj de la revuo ni prezentas novan eron gviditan de Iñaki Vélez; temas ĝi pri prezento de tekstoj kaj aŭtoroj de la esperantlingva literaturo sub la rubriko "La legemulo". Ni esperas ke ĝi iĝos taŭga instrumento por instigi vian legemon en esperanto.



Ĝis

GABRIEL ARESTI : 20 JAROJ
EN LA MEMOR' (J.M. Sarasua)

Nire aitaren etxea

*Nire aitaren etxea
defendituko dut.
Otsoen kontra,
sikatearen kontra,
lukurreriaren kontra,
justiziaren kontra,
defenditu
eginen dut
nire aitaren etxea.
Galduko ditut
aziendak,
soloak,
pinudiak;
galduko ditut
korrituak,
errentak,
interesak,
baina nire aitaren etxea defendituko dut.
Harmak kenduko dizkidate,
eta eskuarekin defendituko dut
nire aitaren etxea;
eskuak ebakiko dizkidate,
eta besoarekin defendituko dut
nire aitaren etxea;
besorik gabe,
bularrik gabe
utziko naute,
eta arimarekin defendituko dut
nire aitaren etxea.
Ni hilen naiz,
nire arima galduko da,
nire askazia galduko da,
baina nire aitaren etxeak
iraunen du
zutik.*

Defenderé la casa de mi padre

Defenderé
la casa de mi padre.
Contra los lobos,
contra la sequía,
contra la usura,
contra la justicia,
defenderé
la casa
de mia padre.
Perderé
los ganados,
los huertos,
los pinares;
perderé
los intereses,
las rentas,
los dividendos,
pero defenderé la casa de mi padre.
Me quitarán las armas
y con las manos defenderé
la casa de mi padre;
me cortarán las manos
y con los brazos defenderé
la casa de mi padre;
me dejarán
sin brazos,
sin hombros
y sin pechos,
y con el alma defenderé
la casa de mi padre.
Me moriré,
se perderá mi alma,
se perderá mi prole,
pero la casa de mi padre
seguirá
en pie.

Antaŭ 20 jaroj forpasis la eŭska poeto Gabriel Aresti (1933 - 1975). Li estis unu el la plej firmaj defendantoj de komuna lingvo literatura -t.e. *euskara batua*- kaj ankaŭ renoviganto de la eŭska poezio, ĝis tiam korsetita en mallarĝaj ŝablonoj de temaro preskaŭ ekskluzive religia aŭ kampara. Jen du esperantaj versioj de unu el liaj plej konataj kaj kantataj poemoj: *Nire aitaren etxea*. Maldekstre ni prezentas, por komparo, la eŭskan originalon kaj ties hispanan tradukon far Aresti mem.

Mi defendos la patran domon


Mi defendos la patran domon.
Kontraŭ la lupoj,
kontraŭ la sekeco,
kontraŭ la uzuro
la patran domon mi defendos.
Mi perdos la brutaron,
la agrojn,
la pinarojn;
mi perdos la interezojn,
la renton,
tamen mi defendos la patran domon.
Oni fortiros de mi la armilojn
kaj mi defendos per la manoj
la patran domon;
ili tranĉos al mi la manojn,
kaj per la brakoj
mi defendos la patran domon;
ili senbrakigos, senbrustigos min
kaj mi per la animo
defendos la patran domon.
Mi mortos,
mia animo perdiĝos,
mia idaro perdiĝos.
Sed la patra domo
daŭre elstaros.

Trad. Rafael Blanco (1988)

Mi defendos la domon de la patro

Mi defendos
la domon de la patro.
Kontraŭ luparo,
kontraŭ sekeco,
kontraŭ uzuro,
kontraŭ justico,
mi defendos
la domon de la patro.
Mi perdos la brutojn,
la hortojn,
la pinojn;
mi perdos rentojn,
interezojn,
dividendojn,
sed mi defendos la domon de la patro.
Oni forrabos miajn armojn
kaj per la manoj
mi defendos la domon de la patro;
oni detranĉos miajn manojn
kaj per la brakoj
mi defendos la domon de la patro;
oni senbrakigos, senŝultrigos,
senbrustigos min,
kaj per l' animo
mi defendos la domon de la patro.
Mi mortos,
animo mia pereos,
idaro mia pereos,
sed la domo de la patro
staros plu.

Trad. Antonio Valén (1995)



PAROLI SUKE... *

Gonçalo Neves



(*) *Ampleksa resumo de prelego eldirita okaze de la XV-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj kaj publikigita en Nia Bulteno (organo de Portugala Esperanto-Asocio) numero 65, pĝ. 8-10.*

Kiam fakte naskiĝis la parolata Esperanto? Laŭ la tradicio, la unua interparolo komunuma nialingve okazis en Varsovio, en 1888, inter Zamenhof kaj la pola pioniro Grabowski. Kaj kiunivela ĝi estis? Oni povas apenaŭ imagi. Unuflanke Zamenhof, la Kreinto, la iniciatoro, esplorinta ĉiujn angulojn de la lingvo, sed neniam ĝin parolinta kun alia homo; aliflanke Grabowski, poligloto, eksvolapükisto, studinta la lingvon je elementa nivelo, fakte je la nivelo de la unua libro.

La jaro 1905 markas turno-punkton en la buŝ-evoluo de Esperanto. Tiam ja okazis en Francio la unua Universala Kongreso, tiam la adeptoj ja ekhavis la okazon unuafoje aŭskulti kaj parole uzi la lingvon. Pri la nivelo oni povas nur konjekti. Por la kongreso oni elektis prezidanton -kompreneble, Zamenhof- kaj kvin vicprezidantojn, el kiuj nur unu iom scipovis Esperanton. Krome oni starigis Lingvan Komitaton, kien oni alelektis 99 anojn. Nu, el tiuj komitatanoj nur 20 kapablis kontentige paroli la lingvon, kaj eble nur 3 aŭ 4 povus serioze gvidi ĝian evoluon. Laŭdire tie troveblis ankaŭ birdoj, kiuj ne sciis skribi eĉ tri liniojn en korekta Esperanto!

Aliaj tempoj, aliaj moroj. Nia lingvo evoluis dum tuta jarcento, skribe kaj parole. Tamen oni povas facile konstati ke multaj homoj parolas Esperanton iom magre kaj sensuke, ne pro talento-manko, sed ĉefe tial ke ili emas sekvi la vortumojn kaj spiriton de sia nacia lingvo. La sekvan konsilaron mi adapte ĉerpis el kelkaj aŭtoroj meditintaj pri tiu problemo, kaj ankaŭ el miaj propraj spertoj kaj rezonoj.

Jen do kvazaŭa dekalogo:

1.- Ne parolu komplike, do ne pensu komplike. Paroli suke ne signifas paroli baroke. Ne imitu la burleskan figuron kreitan de Georgo Kamaĉo! Se vi volas diri "taksio", ne diru "taksimetra veturilo"; la spegulon de via necesejo ne nomu "tualeteja reflektilo"; se vi intencas veturi metroe kun amiko, sufiĉas demandi: "Kien ni metrou?", anstataŭ tordi la langon: "Al kie ni projektu metropolinien?"

2.- Ne traduku proverbojn kaj idiotismojn el via lingvo! Nenio pli teda ol rondo de divers-nacianoj, kiam ĉiuj decidas laŭvorte esperantigi plej fremdajn parol-turnojn kaj diraĵojn. Uzu la zamenhofan proverbaron, kie abundas apenaŭ ekspluatataj trezoroj. Unu paĝo da Proverbaro instruas pli ol dek prelegoj, ĉefe se temas pri la miaj.

3.- Ne trouzu la adjektivajn participojn, kaj la aktivajn kaj la pasivajn, kiam ili ne vere necesas. Se vi volas diri "Ni trovos multajn obstaklojn", ne diru "Estas trovotaj multaj obstakloj". Kaj ne forgesu ke, anstataŭ diri: "Se mi estus farinta", vi povas diri, pli rapide kaj samklare, "Se mi farintus". Anstataŭ "La libro estis aĉetita, legita kaj disvastigita tra la tuta lando", oni povas diri: "La libron oni aĉetis, legis kaj disvastigis tra la tuta lando". Ĉi lasta rimedo evitigas ankaŭ la troan ripetadon de la verbo "esti", kiun cetere indas ripozigi de tempo al tempo, ĉar alternativoj feliĉe ne mankas: resti, kuŝi, stari, sidi, situi, ekzisti, stati, troviĝi, aŭ eĉ, laŭ la kunteksto, eci.

4.- Vi povas atingi belan efekton de kroĉante la sufiksojn disde la vortoj. Rimarku ekz. la diferencon inter "Li paliĝis, senmoviĝis, silentiĝis" kaj la jena "Li iĝis pala, senmova, silenta".

5.- Uzu ĉiujn pov-eblojn de nia lingvo. Ne nur la praesperantaĵojn "Jam temp' está", "Kadó, kadó!", sed eĉ plej sukajn modernajn esprimojn: "sat!", "sat' pri tio!", "eks' pri tio!", "ek!". Kaj ne forgesu ke, anstataŭ diri "rapide!", oni povas uzi la zamenhofan "rap! rap!".

6.- Ne forgesu ke la akuzativo ebligas liberan vort-ordon. Eksploatu tiun liberon! Alŝovu la plej gravajn direndojn ĝis la komenco aŭ la fino de la frazo. Ekz.: "**Lingvojn** oni lernu prefere infanaĝe".

7.- Kaj la verboj? Konatiĝu kun la u-formo! Ĝi ŝparos al vi vortojn kaj balastojn. Viaj frazoj iĝos pli elegantaj kaj elastaj. Ekz.: anstataŭ "Ĉu vi volas ke mi helpu vin?", sufiĉas diri "Ĉu mi helpu vin?". Anstataŭ la monstra "Malpermesate fumi ĉi tie!", eblas vortumi en pura Esperanto: "Ne fumu ĉi tie!".

8.- Mi ĵus diris "vortumi". Jen mirinda sufikso, kies potencialon oni apenaŭ eksploatas. Prezentu al vi jenon. Via filo prenas skribilon kaj fuŝ-desegnas sur la muro de via ĉambro. Kion li faras? Li skribumas la muron. Same buboj vomumas la kuirejan plankon kaj pisumas tapiŝojn, sed tamen oni ne kapablas riproĉi, oni ilin eltenas kaj kisumas la vangojn, la frunton.

9.- Uzu participojn en adverba formo, kaj aktive kaj pasive. Anstataŭ "Post kiam mi ricevis monon, mi aĉetis komputilon", oni diru, pli elegante kaj koncize: "Ricevinte monon, mi aĉetis komputilon". Komparu jenajn frazojn: "Mi rezignis, ĉar oni min atakis de ĉiuj flankoj" kaj "Atakate de ĉiuj flankoj, mi rezignis".

10.- Laste sed ne balaste, legu! Legu abunde kaj redunde! Elektu precipe verkojn de talentaj aŭtoroj, freŝaj, sukaj kaj trafaj, lertaj manipuli la dialogan lingvon. Jen kelkaj ekzemploj: *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz, *Klaĉejo* de Karolo Piĉ, *Don Kiĥoto*, tradukita de Fernando de Diego, *Sed nur fragmento*, de Trevor Steele, *La verda raketo*, de Jean Forge, i.m.a.

Ĉi-jare la saltema EMA, per unu paŝego, ekaperis en la franca departemento Lot revene de Sud-Eŭskio. Ĉe la landlimo ĝi decidis ŝanĝi sian nomon (Eŭska Medioĝuo Aventura) por alia pli taŭga kaj post mallonga pripensado konkludis, ke Enkastela Memorprena Aventuro estas la plej ĝusta kaj trafa.

Kunvenis pli ol dudek homoj el Italio, Nederlando, Eŭskio kaj ĉefe el Francio en malzorgata -sed ĉarma kaj histori-plena- kastelo situanta 4 km. for de Le Vigan kaj 40 km. for de Cahors. La nuraj ĉambroj loĝeblaj estis la necesejo, la kuirejo kaj la manĝoĉambro; tamen, dank'al la bela vetero kutime ni manĝis sur la ĝardeno. Aliaflanke, la ĝentilaj organizaj respondeculoj gastigis nin en tre komfortaj tendoj; tiel ke ĉiu nokte niaj kompatindaj ostoj feliĉe resaniĝis sur aermatracoj.

La ideon rendevui en ĉi kastelo ekhavis Gloria, kiu kelke da tempo en sia infaneco loĝis en ĝi -kiam tiu bieno estis eksperimenta kolektivejo apartenanta al la hispana anarkista movado-. Apude troviĝas plezuriga arbaro kie per eta klopodo oni povas sin imagi proksima al zapatista kampadejo.

La afableco de la nunaj posedantoj, kiuj permesis nin gastigi, ebligis agrabletosan esperantan renkontiĝon, kune kun la lerta gvidado de Gilles (kiu ĉiu tago paŝtistumis) kaj la kontribuo de ĉiuj kiuj helpis plani ĉi EMAn.

Kiel dum la pasinta franca EMA, la manĝaĵoj estis arte kuiritaj de spertuloj kiuj regalis eĉ la kanibalajn stomakojn. Kiam la subskribanto alvenis hejmen ĉiu familiano rimarkis ke li grasiĝis (tamen, tion li ja suspektis, malgraŭ la ĉiutagaj promenadoj).

Ĉi-okaze oni aranĝis ses ekskursojn sufiĉe ebenajn. Fakte ĉiu homo iris laŭ sia ritmo, babilante kun siaj migrokamaradoj pri aferoj gravaj au bagatelaj, ĝuante belegan pejzaĝon tra bone rimarkeblaj padoj. La naturo ĝentile akceptis nin kaj liveris eksterordinarajn panoramojn por plenigi niajn okulojn, riverojn por nin bani survoje, sunan veteron kaj brilajn ĉielojn, friskajn ombrojn por restadi ...

Kelkfoje promenadoj miksiĝis kun vizitoj al unikaj spektakloj, kiel la grandioza kaverno de Padyrac aŭ tiu groto en La Cave kun ĝiaj fajnegaj kalkaj skulptaĵoj kaj mirigaj kuriozaĵoj. Ĝuste tuj post la rigardado de ĉi lastaj la esperantista trupo eraris la vojon kaj eniris en vastan herbejon kies vegetaĵoj atingis niajn kapojn. Nena, la hundino, ne troviĝis tro kontenta.

Tamen, mi taksas tiun piediradon unu el la plej ĝuigaj, ĉar ripozite en hejmeska restoracio tute for de la civilizacio (mi certas ke Marcel ne estas la sola kiu memoras tiun monumentan glaciaĵon piran kiun li forglutis) ni internigiĝis en arbaron ĉe la bazo de impona krutajo, de kie oni povis frandi okulfrapan pejzaĝon banatan de la milda lumo ruĝa de baldaŭ malaperonta suno.

Kiel amanto de promenadoj tra montaj vojoj kiel eble plej malproksimaj al homaj spuroj, mi sentis min kvazaŭ en paradizo kiam ni migris 10 km. funde de nekredeble bela interkrutejo kun ruiniĝintaj muelejoj ie tie disaj. Tiun tagon ni vizitis kaj trarigardadis la urbon Rocamadour, unuavica celo de pilgrimantoj kaj turistoj. En tiea preĝejo niaj oreloj gustumis koncerton de klasika muziko.

Dum ĉi EMA ni trapromenis ankaŭ Cahors. Kaj la vilaĝon St-Cirq Lapopie, kies ĉarmajn stratetojn (rifuĝejo de artistoj kaj metistoj) ne rajtis subtrreti rado veturila. Preterdire, la antaŭan tagon ni noktomanĝis kun la posedantoj de la kastelo por danki ilian ĝentilecon. La trankvila komenco de tiu kunveno ne permesis antaŭvidi ĝian ĥaosan finon, sed kiam oni fortrinkis ĉiujn botelojn da vino kaj neniu atendis la alvenon de plia alkoholaĵo, sinjoro Delché solene elmergiĝis el sia kelo akompanata de kelkaj boteloj de la fama vino de Cahors, kiujn sekvis pli ol



kvindekjara brando. Tiam Daniel ekprenis sian gitaron kaj ĉiuj ni komencis gaje kanti kune (ĉar antaŭe ciu kantis laŭvole, unu aŭ plurope). Persone, mi min apartigis de la festo kiam mi konsideris ke ankoraŭ ne tro malfacilas trovi la vojon ĝis mia tendo, sed la “bakĥanalio” pludauris. Konsekvence, la postan matenon kelkaj diboĉintoj preferis ne promeni de Bouzies ĝis St-Cirq Lapopie laŭ la rivero Lot.

Mi volas gratuli tiujn kiuj zorgis pri la organizado de ĉi intensaj tagoj, ĉar iliaj streboj rezultigis semajnon el plezuriga etoso esperantista kiu satigis la partoprenantojn, almenaŭ ĝis la venonta EMA, per naturo kaj vidindaĵoj.

Kaj ĉar mi menciis la naskotan EMAn -tion diru al neniu, temas ja pri sekreto-nidire ĝi okazos en Nederlando, sur velŝipo. Aliaj aŭdis ie ion pri Kaseda, en Suda Eŭskio. Tiuj du sugestoj estas neelteneble allogaj, kaj kiel ĉiam, la prezo estas maltaŭga preteksto por ne ĉeesti. Ĉu ci kuraĝas?

Andi von Plaza - Joxemari Sarasua.

E-O EN RADIO

Radioelsendoj en Esperanto Kompleta listo laŭ la stato en aprilo 1995

| Tempo (UTC) | Radio (Loko) | Regiono (Loko) |
|-----------------------|-----------------|---|
| ĉiutage 03.30-04.00 | R. Bandeirantes | Brazilo/cetera Ameriko: 11925 |
| dimanĉe 04.30-04.55 | R. Aŭstrio | Eŭropo: 6155 13730 |
| sabate 05.30-06.00* | Litova Radio | Eŭropo: 9*10 (nur lastan sabaton de monato) |
| dimanĉe 07.00-07.30 | R. Havano | Nord-Ameriko/Pacifiko: 6195 |
| dimanĉe 10.30-10.55* | Pola R. | nur per satelito (vd. sube) |
| ĉiutage 11.00-11.25 | R. Pekino | Orienta Azio: 6955 9480 |
| dimanĉe 11.30-11.55 | R. Aŭstrio | Eŭropo/Afriko: 6155 |
| ĉiutage 13.00-13.25 | R. Pekino | Suda Azio: 11650 11840 |
| ĉiutage 13.30-13.55* | Pola R. | Eŭropo: 6135 7145 285 9525 |
| dimanĉe 15.00-15.30 | R. Havano | Ameriko/Karibio: 11720 |
| dimanĉe 18.30-19.00 | R. Havano | Eŭropo/Mediterraneo: 11720 |
| dimanĉe 19.20-19.29* | R. Vatikano | Eŭropo: 327 1530 (mezondo); 4010, 5882 |
| merkrede 19.20-19.34* | R. Vatikano | 1611 (mezondo); 6185 7365 |
| sabate 20.00-20.20 | RAI, Romo | Eŭropo: 7275 9755 11800 |
| ĉiutage 20.00-20.25 | R. Pekino | Eŭropo: 7405 7470 9965 15370 |
| ĵaŭde 20.15-20.30* | Estonia Radio | Norda Eŭropo: 1035 (mezondo); 5925 |
| ĉiutage 20.30-20.55* | Pola R. | Eŭropo: 6095 6135 |
| dimanĉe 22.00-22.30 | R. Havano | Eŭropo/Mediterraneo: 11720 |
| merkrede 22.15-22.25* | R. Sarajevo | Eŭropo: 612 (mezondo); 7105 |
| ĉiutage 22.30-22.55 | R. Pekino | Suda Ameriko: 6955 9480 |
| dimanĉe 23.30-24.00 | R. Havano | Ameriko: 6195 9550 11760 |

* ekde 1995-09-24 unu UTC-horon pli malfrue

Mez-Eŭropa (Vintra) Tempo = Universala Tempo (UTC) + 1 horo
Mez-Eŭropa Somera Tempo = Universala Tempo (UTC) + 2 horoj

Nombro de Esperantaj elsendoj internaciaj en semajno: 62-63
Entuta elsendotempo en semajno: 26 horoj 28 minutoj

Elsendoj pere de satelito: *Pola Radio* (ĉiuj elsendoj): Eutelsat Hor Bird 1, 13 gradoj de la orienta longitudo, frekv. 11080 GHz, polarizado H (horizontala), aŭdofrekv. 8,28 MHz; *Radio Vatikano* (dimanĉe): Eutelsat II-F1, 13 gradoj de la orienta long., frekv. 11354 GHz (MBC), polarizado H, aŭdofrekv. 7,74 MHz

Kelkaj lokaj radioelsendoj

- Aŭstralio:** Radio 3.ZZZZ 92,3 FM (Etna Radio), P.O. Box 1106, Collingwood, Victoria 3066
- Brazilo:** Radio Rio de Janeiro, Brazila Spiritisma Federacio, Arda Passos 30, BR-2005 I-000 Rio de Janeiro - RJ
- Francio:** Radio Esperanto, 145 rue Amelot, FR-75011 Paris; Radio F.M.R., BP 2435, FR-31085 Toulouse CEDEX
- Hispanio:** Radio Klara, 102,6 FM, F.N. Clemente, Calixto III, 36, ES-46008 Valencia
- Hungario:** Esperanto Radio, HU-1800 Budapest
- Italio:** Radio Radicale, Via Principe Amedeo 2, IT-00185 Roma
- Jugoslavio:** Radio Pingvin, Autoput 2, YU-11070 Beograd
- Nov-Zelando:** Access Radio, Wellington (David Ryan, P.O.B. 3867 Wellington)

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de tiu ĉi rubriko: s-ro Josef Lechermeier, Waldeysenstr. 191311, DE-85057 Ingolstadt, Germanio. Se eblas, bonvolu almeti reafrankon.

Korespondadresoj kaj ĝeneralaj informoj

Radio AŬSTRIO Internacia: AT-1136 Wien (= Vieno), Aŭstrio (tel./faks. +43/1/87878-3636; fakso +43/1/87878-3630).

Radio BANDEIRANTES: C.P. 372, BR-01059-970 São Paulo - SP, Brazilo.

ESTONA Radio: EE-200100 Tallinn, Estonio.

Radio HAVANO: Apartado 6240, La Habana, Kubo (tel./faks. +53/7/795-007). Dimanĉe trifoje al Ameriko kaj dufoje al Mediteraneo kaj Eŭropo. En Eŭropo kelkfoje bone kaptebla.

LITOVA Radio, Vilno: Radiocentras, A.D. 1792, LT-2019 Vilnius, Litovio. Lastan sabaton de ĉiu monato.

Radio PEKINO: 2 Fuxingmenwai Avenue, Beijing 100866, Popola Resp. Ĉinio. Ĉiutage 4-foje al diversaj mond-regionoj; la elsendo por Eŭropo okazas ekde la 20-a horo laŭ UTC.

POLA Radio, Varsovio: Skrytka pocztowa 46, PL-00950 Warszawa, Pollando (tel. +48/22/459-358, 459-337; fakso 444-123). Disaŭdigas ĉiutage 2 programojn, ĉefe por eŭropaj aŭskultantoj.

RADIOTELEVISIONE ITALIANA (RAI): C.P. 320, IT-00100 Roma, Italio. Sabate 20-minuta programo por Eŭropo.

Radio SARAJEVO: fakso +387/71/455-141. Korespondadoj al Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5, pk. 499, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

Radio VATIKANO: IT-00120 Città del Vaticano (fakso +39/6/698-38-44). Dufoje semajne por aŭskultantoj en Eŭropo kaj en la Proksima Oriento.

Aŭskultu la voĉon de Sarajevo

Esperanto el Sarajevo: 16 elsendoj de Radio Sarajevo en Esperanto, inter aŭgusto 1994 kaj januaro 1995. 2 x 00 min. 30.00 gld.

LA LEGEMULO

(NIA LITERATURO SPECIMENE...)

Paul Neergaard

FLUGANTAJ SEMOJ

(Ĉapitro el la verko "LA VIVO DE LA PLANTOJ")



Antaŭ trideko da jaroj mia patro aĉetis kamparan domon kun terpeco de du-tri hektaroj, plejparte herbokampo kaj iama torfejo. La herbo de nia kampo donis furaĝon por unu ĉevalo, kaj ni sentis nin kiel veraj kamparanoj. Sed dise ni plantis piceojn kaj pinojn, kelkajn betulojn kaj fraksenojn kaj citizojn kaj apud la domo pli delikatajn arbojn kiel tujon, kameciparidon kaj noblan abion.

Nun disvolviĝas sur nia grundo peco da sovaĝa naturo. Tiuj arboj, kiujn ni plantis, kiam mi estis knabo, fariĝis grandaj, sed tie kaj ĉi tie, en la plej diversaj lokoj, je longa distanco de la grandaj arboj, ekaperas nun amaso da malgrandaj arbetoj, tute surprize, ĉar oni povas konstati, ke ili estas infanoj de la gepatroj, kiuj kreskas malproksime de tiuj lokoj, kie sukcesis enradikiĝi tiuj ĉi nov-alvenintoj.

En fora angulo staras granda acero. Ankaŭ ĝi ekhavis nun idojn je longa distanco de sia loko. Ĝia globa nukso portas grandan flugilon, duope la nuksoj formas perfektan ŝvebaviadilon – ĝemeloj kiel ĉiam estas tiuj fruktoj. En kvieta vetero la semo ronde turniĝas, kiam ĝi malleviĝas tra la aero, sed kiam la vento forte blovas, la flugilo helpas al la semo longe forflugi. Neniel, tamen, komparebla kun la betulo, kiu vere nin turmentas sur la grundo.


Kiel trudherbo la betulo ekaperas ĉie, la fruktetoj estas tre malpezaj kaj krome ĉirkaŭitaj de papere maldika, korforma portilo, por ke la vento povu ilin disen kirli. Sekve fariĝas tro multaj el tiuj belaj, blankŝelaj arboj ĉi tie, kaj nun ni devas haki kaj multe peni por forigi ilin, tiomgrade la etaj, flugantaj konfetoj komencas transpreni la potencon.

Eĉ nun montriĝis kelkaj ulmoj, kaj ilin tamen ni ĝis nun evitis sur la tereno. Ni malkovris, ke ili sendube devenas de la komunuma vojo, situanta je distanco de kvinminuta promeno de tie ĉi. Forta vento supozeble portis aere la flugilhavajn ulmofruktojn, kaj nun ili desupre falis al ni kvazaŭ manao el la ĉielo, sed malpli bonvenaj ol la manao de la Biblio, al kiu asignis la popola kredo ja i.a. ankaŭ la ulmofruktojn. Kiam mi estis knabo, miaj kamaradoj kaj mi kolektis manaon en la strato antaŭ nia lernejo, ĉe granda parko, kaj ni gustumis la nukseton, kiu sidas en la mezo de la flugilo. Ni imagis al ni la situacion dum la dezerta migrado, tutaj neĝamasoj da tiuj ĉi fruktoj abundis, malavaro de la naturo. Kaj ni imagis al ni la amatan parkon, al si mem tute lasitan, iom post iom transformita al unu grandega arbaro plena de ventokirlita manao.

La balzamino kun sia fragila sukstreĉo estas ĉarma planto. Ĝi havas fajroruĝan tigon, freŝe verdajn foliojn, flavajn kun ruĝaj punktoj, ĝia longa frukto estas kapsulo kun multaj grajnoj. La frukto estas la pafilo de la planto. Se oni tuŝas per fingro ĝian pinton, ĝi krakete eksplodas, kaj grajnoj dissaltas en ĉiujn direktojn. En frakcio de sekundo la diskrevinta frukto retroruliĝas kaj finas sian ekziston falante al la tero kiel taŭzita fadenaro, dum la grajnetoj rapidegas for de la gepatra planto. Aktiva, drama memdisvastigo de semo.

El *La vivo de la plantoj*. Popularscienca eldonserio n-ro 1.
J. Régulo (Stafeto), *La Laguna* 1957, p. 69-77.

PETU ĜIN
ANKAŬ
EN VIA
ASOCIA
BIBLIOTEKO!



LA VIVO
de la
PLANTOJ

Paul Neergaard

Desegnaĵoj de Mads Stage

126 paĝoj.

Eldoĵejo: J. Régulo (Stafeto)
924 ptoj en HEF-LibroServo.
15 gld. en UEA (triona raba-
to ekde tri ekzempleroj).

PAUL NEERGAARD (1907-1987). Dano. Diplomito pri agronomio kaj specialisto pri la genetiko kaj patologio de plantoj. Esperantiĝis en 1924. Dum multaj jaroj li estris la sektion de la dana Ŝtata Plantpatologia Servo. De 1967 direktoro de la dana Ŝtata Instituto de Sempatologio por Evolulandoj. Kiel faka aŭtoro kaj esploristo li fariĝis tre konata, verkante multajn studojn en la dana, angla kaj Esperanto.

En la Internacia Lingvo li aŭtoris, inter aliaj: "Fremdvortoj en Esperanto" (1933), "Tra densa mallumo" -kunaŭtore- (1942), "Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj" (1954), "La vivo de la plantoj" (1957), ktp. De 1949 ĝis 1961 li redaktis la revuon "Esperantologio". PIV-respondeculo pri diversaj fakoj. Akademiano...

"**LA VIVO DE LA PLANTOJ**", kies specimenaĵoj prezigas ĉi-supre, estas plivastigita reverko de tre sukcesa danlingva verko kaj tradukiĝis el Esperanto en la bulgaran, ĉinan, finnan, litovnan, norvegan, polan, portugalan, serbo-kroatan, svedan... Ankoraŭ modela por fakaj verkoj en nia lingvo, la libro... "rezultas el feliĉa kombino inter teoria erudicio kaj pedagogia konkretigo tiel karakterizaj por la aŭtoro. Abundas frapaj komparoj kaj bildigoj, kiuj simpligas eĉ tre komplikajn fenomenojn en la planta mondo... Tiu ĉi verko ebligas al ĉiu leganto fari ĉerman promenadon tra la plantaj ĝangaloj... Kaj ĉie la delikataj desegnaĵoj de Mads Stage akompanas la tekston..." (J. Régulo).

Mi denove pritraktos la eksJugoslavian konflikton, kiu ĝis la plej ofta temo dum la kvar jaroj de tiu-ĉi sekcio de KUSPE, kvamkam malfacile ja estas diri iom en la nuna konfuzo.

Sendube la situacio vere ŝanĝiĝis kompare al du-tri antaŭaj monatoj. Unuflanke la serboj de Bosnio konkeris Srebrenica kaj Zepa, sed la plej grava aspekto konsiderenda estas la grandega venko de Kroatio en Krajna. Fine oni devas mencii la bombatakojn de flugiloj de la Organizo de la Traktato de la Norda Atlantiko (NATO) kontraŭ serbo-bosniaj armilaj havejoj.

Paradokse ĉi tri militaj faktoroj povas faciligi la pacakordon. Politiko de Usono, kiu kreigis la konfederacion Kroata-Bosnian, multe kontribuis, akceptante la rekonkeron de Krajna kaj puŝis la ekbombardon post longa malagado.


La krajna venko kaŭzis la restabligon de la zagreba suvereneo en tiu regiono kaj la fuĝon de la plejmulto serba. Sammaniere oni atingis malaperigi la serban premon kontraŭ Bihac kaj malfortigi la pozicion de Karadžić.

Certe la fikcioj pri serbaj respublikoj en Kroatio kaj Bosnio ne plu staras, la unua perforte, kaj la dua ĉar la psikiatro perdis la batalon politikan kontraŭ Milosevic, kiu danke al kontrolo sur la tieaj generaloj (kaj Mladic ne estas escepto) montris kiu regas la situacion. Tio vere evidentiĝas pro la fakto ke en la packonversacioj la serba delegacio estos ununura kaj kontrolata de Milosević.

Al ĉi-supre de ĉiuj konitaj menciitaj faktoj, ni aldonu kelkajn demandojn tiklajn:

- Kial Unuiĝintaj Nacioj ktp. permesis la perdon de Srebrenica, Zepa kaj poste forlasis Gorazde, neniel agante malgraŭ televida genocido, kaj nun sendas siajn bombflugilojn por "protekti" Sarajevo?

Mi trovas jenan respondon: oni deziras pacakordon surbaze de teritoria disdono, kies rezulte serboj atingos la tutan sudorienton de



Bosnio sen islamanaĵoj kaj la islamanoj akiros la mezon inkluzive Sarajevo, nuntempe izolita.


- Kial serboj de Krajna estis tiom facile kaj rapide venkitaj?

Mi ne malgravigas la kapablon de la kroata armeo, sed verŝajne Miloseviĉ ne bedaŭris multe tiun malvenkon. Ĉu temas pri konverĝo de interesoj inter Tudjman kaj la lidero de Beogrado por atingi ne la revon de ambaŭ, Grandan Kroation kaj Grandan Serbion (neakordigeblaj ja estas) sed almenaŭ grandetajn Kroatio kaj Serbio respektive, je la malprofito de la islamanoj.

La respondo kuŝas en Orienta Slavonjo, kroata teritorio landlima al Serbio konkerita de la jugoslava armeo kaj okupita de serboj. Tudjman promesis al sia popolo la reintegrigon, ĉu interkonsente ĉu perforte. Tiu ebla interkonsento kun Beogrado apartenos al pli granda akordo kadre de la antaŭe maenciita vojo. Atako al tiu teritorio preskaŭ certe signifos frontan kolizion inter ambau regionaj potencoj, elmerĝiga Kroatio kaj deklina Serbio.

Ni memoru ke NovJugoslavio suferas longan ekonomian blokadon, tamen ĉiam pli rica Kroatio reorganizis sian ekonomion post la malvenko kaj samtempe havigis al si modernajn armilojn kaj formis timigan armeon.

La lernaĵo kiun ni enkapigas estas ke la manko de moralo ĉe la internaciaj instancoj senhonte evidentiĝas kaj ke bedaŭrinde la perforto kaj la armea potenco (kun sia ekonomia postulo) estas la plej grava faktoro por ŝuldi en la internacia sfero.



39a IS
INTERNACIA SEMINARIO

WETZLAR (HESIO)
27.12.95 - 3.1.96

Germana Esperanto-Junularo

PERFORTO

Aliĝilon al:

Holger Boos, Kräuterweg 25, 51069
Köln, Fakso: +49-221-685 597

FIKEJ

12 - 15 Oktobro 1995


FRANCA IBERIA
KONFERENC

DE LA E-O JUNULAR'

Organizata de *Valencia Esperanto-Junularo*
kaj *Eŭropa Junulara Esperanto-Oficejo en Bonn* 

"Casal d'Esplai de l'Ajuntament de València" Rocafort

PRAGO



81-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
20-27 julio 1996
Prago, Ĉeĥa Respubliko

27^a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

12 - 15 OKTOBRO 1995
MATARÓ (El Maresme)

16.00
18.00
20.00
21.00
22.00

Literatura Matero kun Intereno de Gerit Ber-
yelling (redaktoro de Fonto) Ĵak le Puil (redaktoro
de La Kancerfliniko) kaj aliaj fakuloj.

10.00
11.00
12.00
14.00

Fakaj kunvenoj
Atelieroj diversaj
Esperantlingva prelego
Tagmanĝo
Esperantlingva prelego
Filmo
Publika katalunlingva prelego
Vespermanĝo

Arta Vespero (Miguel Fernández kaj Ĵak le Puil)

Esperantlingva prelego
Filmo
Publika katalunlingva prelego
Vespermanĝo
Arta Vespero (Festivalo pri diverseco)

KONGRESTEMO: LA TOLEREMO (De la interkompreniĝo al la
toleremo. De la kultura diverseco al la rasmik-
siĝo)

54^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



SALOU, 9^a—12^a DE NOVEMBRO 1995

ALIĜILOJ POR TIE-ĈI SKIZE PREZENTATAJ RENKONTIGOJ

DISPONEBLAS ĈE LA ASOCIO.

VI ANKAŬ POVAS INFORMIĜI ĈE LA KUNORDIGANTO